



Varma Espero

AUGUSTO. de 2021 No. 5

Redaktoro: Boneca Amiko **Kultura Studĉambro:** Freŝa Maro (Je Nianŝian, Esploristo en Ĉina Akademio de Socia Scienco, Beijing, Ĉinio) F_maro@139.com

Tri ĉinaj astronautoj por Shenzhou-13



La 14-an de oktobro oni oficiale diskonigis la tri astronautojn, kiuj flugos al la ĉina kosmostacio per kunhoma spacveturilo Shenzhou-13. Ili estas Zhai Zhigang, Wang Yaping kaj Ye Guangfu, inter kiuj Zhai Zhigang estas la komandanto. La misio Shenzhou-13 komenciĝos je nul horo kaj 23 minutoj de la 16-a de oktobro.

La tri astronautoj restos en la spaco por ses monatoj. La tempodaŭro estas normala periodo de restado de astronautoj en kosmostacio. Wang Yaping, astronautino, unuafoje eniĝos en la ĉinan kosmostacion kaj estos la unua ĉina astronautino, kiu plenumos laboron ekster la kerna modulo Tianhe.

Ĉina Esperanto-Ligo donacis librojn al muzeo sub Ŝanhaja

Universitato de Internaciaj Studoj

Por subteni disvolviĝon de la Muzeo pri Mondaj Lingvoj sub la Ŝanhaja Universitato de Internaciaj Studoj kaj aktive antaŭenigi Esperanton, la Ĉina Esperanto-Ligo donacis al la muzeo kvin librojn, *200 Antikvaj Ĉinaj Poemoj* (ĉine kaj Esperante), *Ĉina Antologio* (1979-2009) (Esperante), *Noktomezo* (Esperante), *Rano* (Esperante), kaj *Sieĝata Fortikaĵo* (Esperante). La Ĉina Esperanto-Ligo ricevis atestilon pri libro-donaco de la Ŝanhaja Universitato de Internaciaj Studoj.



Atestilo pri libro-donaco


Zheng Changhao: Edukado akcelis liberiĝon el malriĉeco



26-jaraĝa Zheng Changhao iris al mjaŭ-a vilaĝo Wuying en aprilo de la lasta jaro por helpi al lokanojn liberigi malriĉecon. Tie estis tre malprogresinta la eduka situacio, kaj multaj virinoj pli ol 40-jaraĝaj konas nenian vorton, tial ili ne povas helpi al siajn infanojn lernadon.

Zheng Changhao prenas la edukadon al virinoj kaj infanoj en la vilaĝo kiel gravan taskon. Ĉiutage li gvidis infanojn lerni kaj sin ekzerci. Li estas tre pacienca kaj ŝatata de lernantoj.

Ĉina sondilo sukcese surmarsiĝis



La 15an de majo, surmarsiĝilo portanta la unuan marsan ĉaron de Ĉinio lante falis sur la ruĝan planedon. Estas la unua fojo, ke Ĉinio sendis sondilon sur alian planedon.

Tianwen-1, konsistanta el orbitilo, surmarsiĝilo kaj ĉaro, estis ĵetita de la Wenchang-a Kosmodromo en la sudĉina provinco Hainan la 23an de julio 2020. Tio estis la unua paŝo en la ĉina planeda esplorado de la suna sistemo, kun la celo fari orbitadon, surmarsiĝon kaj vagadon sur la ruĝa planedo en la sama misio. La nomo Tianwen, signifanta demandojn al la ĉielo, venas de la poemo verkita de antikva ĉina poeto Qu Yuan (ĉirkaŭ 340 a.K.-278 a.K.). Ĉinio nomas sian unuan mars-ĉaron Zhurong, dio de fajro en la antikva ĉina mitologio, kiu eĥas kun la ĉina nomo de la ruĝa planedo: Huoxing (la planedo de fajro). La kosmoveturilo eniris la marsan orbiton en februaro post vojaĝo de preskaŭ sep monatoj tra la spaco, kaj restis en orbito dum pli ol du monatoj por esplori eblajn surmarsiĝejojn.

Amatoraj baletistinoj 60-jaraj

La 7-an de julio dancis la membroj de la balet-trupo en la Kultura Centro de la urbo Zhengzhou, centra Ĉinio. La amatoraj baletistinoj aĝas preskaŭ 60 jarojn. Pro amo al la arto, ili venkis multajn malfacilojn.

